

KOLEKTADO

N-ro. 0

Novembro 1978

Ni estas....

...kolektantoj de Esperanto-libroj, revuoj, bultenoj kaj aliaj dokumentoj kaj Esperantaĵoj. Dum jardekoj, ĉiam kun entuziasmo, ni strebadis por kompletigi niajn kolektojn.

Diversfoje dum jaroj, ni vane provis trovi mankantan ekzempleron kaj iun tagon, ne atendite, ĝi aperis tute simple; estas la vera ĝojo kaj emocio de fervora kolektanto.

Sed tiajn ĝojojn kaj plezurojn ni pli facile kaj ofte povus atingi se racie kaj efike ni laborus; se ni, de tempo al tempo interŝanĝus spertojn kaj eltrovojn; se ni agus ekipe.

Bedaŭrinde ni ne estas multaj, sed se ni provus kapti novajn adeptojn, pere de trafdisdonado de niaj duoblaĵoj, eble postnelonge niaj vicoj larĝiĝus kaj aliaj gesamideoj sekvus nian ekzemplon. Ni provu kaj eble ni miriĝos pro nia sukceso.

Tiu ĉi 0 numero de nia humila bulteno estas simpla eksperimento de tio kion ni povus atingi. Ni kore petas al la ricevontoj bv. sendi al nia adreso, almenaŭ simplan poŝtkarton, aprobante aŭ kritikante nian ideon, kaj tio sufiĉos por ke ili regule ricevu kvar fojojn jare nian eblan bultenon.

Havu la afablecon noti nian adreson:

KOLEKTADO ---- Esperanto-bulteno
Str. Forn, 21 - Moyá (Barcelona)- Hispanio.

-Ni ne postulos abonkotizon-

TAŬGAJ LABORILOJ

Ni , la kolektantoj, bezonas la plej konvenajn instrumentojn por efike kaj bone atingi nian celon. Ni ricevas konstantan helpon de la sindonaj samideanoj kaj imitindaj entreprenoj, kiuj verkis utilajn katalogojn aŭ prilaboris indajn studojn.

Ci sube ni listigas kelkajn titolojn kiuj helpis al ni por ordigi niajn kolektojn de Esperanto-libroj kaj gazetoj. Kompreneble la bibliografio ne estas kompleta, sed eble kun la helpo de niaj kolegoj ni estonte povos reveni al la temo kaj prezenti definitivan aron

- 1- ESPERANTISTA SOCIETARO (Konsulejoj, Societoj kaj Gazetoj) - Esperantista Dokumentaro - Paris 1907 - 140 paĝa.
- 2- KATALOGO DE LA BIBLIOTEKO de Sro. Georg Davidov, Ruslando, Saratov - Majo 1887 majo 1908 - 56 paĝa.
- 3- BIBLIOGRAFIO - Katalogo de la biblioteko (1888-1911), de G. Davidov, Saratov - 130 paĝa.
- 4- KATALOGO DE MOSKVA LIBREJO "ESPERANTO" - 7-a eld. januaro 1914 - 24 paĝa.
- 5- CATALOGO di Edizioni Esperantiste n^o 3 - A. Paollet - S.Vito al Tagliamento - Italio, 1928 - 34 paĝa.
- 6- KATALOGO DE LIBROJ - Heroldo de Esperanto n^o 7 - Novembro 1930 - 32 paĝa.
- 7- LIBRO PREZARO de Literatura Mondo - Budapest, 1930 - 20 paĝa.
- 8- ESPERANTO-KATALOGO - Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek - Berlin, 1931 - 36 paĝa.
- 9- ELEKTITAJ LIBROJ EN ESPERANTO - UEA, Rotterdam 64 p.
- 10- KATALOGO de la Libro-Servo de HEROLDO-1964- 40 p.
- 11- SINOPSE de Libros Espiritas - 7^a edicao - Brasil, 1970 - 66 paĝa.
- 12- HANDBOOK 1970 including Book List - BEA- London.
- 13- LIBROSERVO DE UEA - Katalogo 1977/78 - 256 paĝa.
- 14- BIBLIOGRAFIJA (Bibliografio de Internacia Lingvo en Jugoslavio Marinko Gjivoje- Zagreb 1954- 40 paĝa.
- 15- BIBLIOGRAFIA ESSENZIALE DELLA LINGUA INTERNAZIONALE ESPERANTO - Dott. Bruno L. Marini - FEI - Torino 1952 - 30 paĝa.
- 17- KATALOGO DE LA HUNGARLANDA ESPERANTO-BIBLIOTEKO - Szeged 1969 - 290 paĝa.
- 18- LITERATURO EN JAPANA ESPERANTO-MOVADO -1946 - 1972 - EPA 1973 - 16 paĝa.

- 19- ENKONDUKO EN LA LIBROSCIENCON DE ESPERANTO - Bibliografia gvidilo kun komentario - Reinhard Hauppenthal -Nürnberg 1968- 44 paĝa.
- 20- A RESEARCH BIBLIOGRAPHY ON ESPERANTO AND INTERNATIONAL LANGUAGE PROBLEMS -H.Tonkin - University of Pensylvania -New York 1967- 14-paĝa.
- 21-URBA PUBLIKA BIBLIOTEKO -Kortrijk (Belgio)- Esperanto-sekcio - librolisto 1972.
- 22-CATALOGI KUNSTTALEN II -ESPERANTO - Univer- sitata Biblioteko de Amsterdam- 1969- 56 p.
- 23-ESPERANTA GAZETARO EN LA MONDO - S.Rams - Krakov 1973 - 24 paĝa.
- 24-KATALOGO pri la kolektoj de Internacia Esperanto Muzeo - Hugo Steiner - WIEN 1957
- 25-KATALOGO de la Esperanto-Gazetaro - Dro. Jozefo Takács -Ĉeĥoslovakio 1934 - 168 paĝa.
- 26-HISTORIO DE ESPERANTO (Movado kaj Literarturo) Leon Courtinat - tri voluma verko.
- 27-BIBLIOGRAFIO DE INTERNACIA LINGVO - P.E. Stojan -Bibliografia Servo de UEA -Genève 1929 - 560 paĝa.
- 28-ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO - Literatura Mondo - Budapest 1933-34 - Du volumoj - 600 tekstaj paĝoj kaj multaj ilustraĵoj.
- 29-PRI LA RELIGIA LITERATURO EN ESPERANTO - K.O. Sendgren - 1970 - 55 paĝa.
- 30-ESPERANTO EN PERSPEKTIVO.- Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo - CED de UEA - 1974 - 844 paĝa.

. . .

Kompreneble la antaŭa bibliografio estas nur parta, sed jam labora bazo. Mi volas profiti la okazon por noti kaj ekparoli pri ebla eldonigado de ĝenerala katalogo kun ĉiuj aperintaj Esperanto-libroj kaj gazetoj. La cent jar datreveno de Esperanto estus taŭga dato por aperigi ĝin. Ni havas ankoraŭ naŭ jarojn por prepari la verkon, sed kredeble ni bezonos ilin ĉar la tempo forflugas ege rapide.

Ek al la laboro!

S L O S I L O J

=====

La trafa eltrovo de la brita propagandisto Herbert F. Höveler gajnigis multajn adeptojn por nia nobla ideo. La simpla kaj humila "ŝlosilo" instigis multajn personoj lerni la internacian lingvon.

Laŭ ESPERANTO EN PERSPEKTIVO ĝis nun aperis ŝlosilojn por 39 lingvoj: Afrikana, albana, angla, araba, baska, bulgara, ĉeĥa, dana, estona, finna, flandra, franca, germana, hispana, hungara, islanda, itala, japana, jida, kataluna, kimra, kroata, latva, litova, malaja, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala, romanĉa, romana, rusa, serba, sinhala, slovaka, slovena, sveda, ukraina.

Ankaŭ ni povas aldoni du kiuj ne estas en la antaŭa listo: ARMENIA, Tiflis 1910 kun verda kovrilo kaj BOHEMA (ĉu ĉeĥa?).

Estas diversaj eldonoj en multaj el la indikitaj lingvoj, kun malsama prezento kaj enhavo.

Ankaŭ ekzistas malgrandaj lernolibroj, samformaj kiel la "ŝlosiloj". Ni konas ekzemplerojn en la kataluna, hispana kaj franca lingvoj. Ankaŭ ni volas menciigi la GVIDILO ESPERANTO de la Ruĝa Kruco. Ni konas la francan kaj rusan eldonojn.

La eldonigado de la unuaj "ŝlosiloj" estis privata entrepreno. Jam en 1925 prizorgis la aferon la tiama ICK. Poste UEA daŭrigis la regulan aperigadon. Laŭ la Katalogo 1977/78, ankoraŭ estas akireblaj en kelkaj lingvoj.

Se ni konsideras la aktualigon de novaj lingvoj, ĉefe en Afriko, estus tre konsilinda afero ke UEA aperigu ankoraŭ novajn "ŝlosilojn". Se ili bone taŭgis antaŭ kelkaj jardekoj, ankaŭ nuntempe ili efike povus helpi por la disvastiĝo de la internacia lingvo tra la kvin kontinentoj.

Pretigi kompletan bibliografion kun la indiko de la diversaj eldonoj en la koncernaj lingvoj, ankaŭ estus praktika kaj farinda laboro.

Ĉu iu kuraĝas?

NI SUGESTAS

Ciu posedanto de grava kaj eĉmalgrava Esperanto biblioteko, rajtas havi artan ekslibrison por distingi kaj konigi la proprajn librojn. Estus bona ideo kolekti, listigi kaj poste publikigi, se eble, la plej kompletan katalogon de ĉiuj kiuj koncernas la Esperantan lingvon.

Multaj el ni uzis la Esperantan verkon **KLASIFO DE ESPERANTAJ TEMOJ** de M.C. Butler, por provi ordigi niajn bibliotekojn. Ĉu ĝi bone taŭgis al ĉiuj aŭ oni bezonis enkonduki ŝanĝojn en la sistemo? Ni opinias ke ebla skribado pri la temo povus esti utila al ni ĉiuj.

Ni ne scias kiel estas la laboroj por la aperigado de la tute nova eldono de la grava verko **ENCIKLOPEDIA DE ESPERANTO**. Ni ĝojus se la afero bone kaj rapide progresus.

La bindigado de la kolektoj de Esperantorevuoj ankaŭ prezentas problemojn. Ĉu dikaj aŭ maldikaj volumoj? Ankaŭ estas problemoj de la altaj prezoj de bindigado. Ideoj pri la temo ankaŭ estos kore bonvenaj.

Se ni povus influŝi sur la koncernaj redakcioj de niaj Esperanto-gazetoj, ni kore petus ke ili ne ofte ŝanĝu la formaton de la publikaĵoj. Estas granda problemoj por la kolektantoj.

SEM AJNO

Numero 0 de la indikita revuo kuŝas antaŭ ni. Jus ni legis ĝin tre avide kaj kun granda intereso. La enhavo estas varia kaj trafa.

Ni ege deziras ke la sukcesinda projekto estu longtempa realaĵo.

Ege ni ĝojos se post kelkaj jaroj ni povos montri sur niaj bretoj, luksajn volumojn de la revuo SEMAJNO.

=====

PENSINDA AFERO

=====

Ofte venas al nia penso la tikla demando: Kio okazos kun nia kolekto de Esperantaĵoj kiam ni forlasos la surteran vivon?

Vere estas pensinda afero, ĉar ni elspezis multajn horojn, strebojn kaj monon por akiri kolekton, kiu eble materie validas malmulte, sed morale kaj spirite estas altvalora por la venontaj generacioj, ĉefe, por havi taŭgan materialon pri la internacia lingvo.

Bonŝance niaj filoj estas bonaj esperantistoj kaj ili aprezas nian materialon, sed eble ili ne havos sufiĉan tempon kaj emon por prilabori kaj uzi niajn aĵojn. Pro tio ni devas serioze ekpensi pri la temo.

La elekto ne estas facila, ĉar kelkfoje oni povas elekti gravan enlandan bibliotekon pensante ke tie nia materialo estos larĝe uzata kaj tute ni erariĝas, sed malgraŭ la graveco de la elektita institucio kaj spite ke oni akceptis ĝin kore, oni metas la kestojn en kelo por oportune oridigi la librojn kaj revuojn, sed neniam alvenas la taŭga memento de ordigado.

Foje povas okazi ke ne tiel granda institucio povas prezenti pli oportunajn kondiĉojn kaj rimedojn kaj pro tio ni opinias ke oni devas funde studi la eblecojn kaj adekvate decidi. Estas ni mem kiu devas jam nun solvi la problemon.

Kion vi opinias karaj geamikoj?

Preskaŭ ĉiuj radio-stacioj kiuj havas Esperanto-programon, regule publikigas informan bultenon, kiu ankoraŭ estas kolekteblaj.

Ni kore petas al ĉiuj bv. regule skribi, almenaŭ simplan poŝtkarton al la koncernaj Radio-Esperanto-Redakcioj kun la sciigo ke ni regule aŭskultas ilin.

Ne forgesu: Radio Varsovio, Svisa Radio, Radio Roma, Vatikana Radio, Radio Wien, Radio Zagreb, Portugala Radio, Radio Pekin, Ibra Radio kaj Radio Sa-badell.

NI RICEVIS

MANLIBRO pri Esperanto en bibliotekoj.-Nia elstara verkisto kaj senlaca kolektanto Marinko Gjivoje el Zagreb, Jugoslavio, pretigis manuskripton, kiu farigos libro, estonte.

Nun estas 34-paĝa broŝuro kun interesa enhavo laŭ indiko de la titolo de la verko.

Estas klarigado pri la taskoj de la bibliotekoj: Kolekti, prilabori, konservi kaj ebligi utiligon de la verkoj. Studo de la ĉefaj bibliografiaj verkoj pri la Esperanta temo kaj skizadon de la ĉefaj Esperanto-bibliotekoj: Georg Davidov, Pariza-Centra Oficejo, Biblioteko de IEMW, Biblioteko de UEA, de Brita Esperanto-Asocio, Societaj Bibliotekoj kaj je la lasta grupo estas la privataj. Fine li listigas la Esperanto-bibliotekojn laŭlande.

Vere tre praktika kaj leginda verketo kiu meritas kiel eble plej baldaŭan presigon kun la koncerna larĝigado de la temoj.

Al tiuj legantoj kiuj havas Esperanto-bibliotekon kun pli da mil volumoj aŭ 10 metroj de bretlongo, ni kore petas kontakto kun la aŭtoro de la MANLIBRO, se ili ankoraŭ ne faris tion.

La adreso estas: P.p. 5025, Yu.41040 - ZAGREB - Dubrava - Jugoslavio.

NOVAJLETERO por interlingvistoj.- Jus aperis la 4-a numero de tiu ĉi bulteno, sub redakto de Ulrich Linz, eldonita de CED de UEA (Prezo por 10 numeroj 20 ned. gld.).

Nikopias: 2-2 Tonkin bibliografio: Aperis la 4-a eld. de Esperanto and international language problems: A resserch bibliography. Estas havebla ĉe la Libroservo de UEA.

4-7- Bibliografio de planlingvaj bibliografioj.- Herbert März (Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, A-1010-WIEN, Aŭstrio), grandparte finis la prelaboron por bibliografio de bibliografioj pri planlingvoj. Ĝi entenas proksimume 200 bibliografiojn rilatajn al Esperanto. Mankas informoj pri bibliografioj de Volapük, Interlingua kaj aliaj projektoj. La kompilanto volonte ricevos atentigojn.

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

Tra ĉi tiu sekcio ni povos reciproke helpi nin pere de tiaĝaj respondoj al la duboj prezentitaj. Ni petas vian eblan respondon kaj samtempe ni dankos la sendon de viaj eblaj demandoj.

Demando n^o 1.- Vi bone komas la nunan revuon "der esperantist", kiu aperas en Berlin-DDR., sed mi demandas: Ĉu antaŭ la dua mondmilito en Germanio aperis revuo kun la sama nomo, kaj se la respondo estas jesa, je kiuj jaroj?

N^o 2.- LA GRANDA FAMILIO estis grandformata revuo kies Direktoro estis Carl Franzmann. La unua numero aperis en oktobro 1938. Mi ŝatus scii kiu estis la lasta numero. Mi havas n^o 15 de marto 1940.

N^o 3.- Mi ŝatus scii, por bone ordigi miajn kolektojn, kiuj estis la lastaj numeroj aperintaj de la jenaj revuoj:

AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE (antaŭe AMERIKA ESPERANTISTO kaj AMERICAN ESPERANTIST), Mi havas novembro kaj decembro 1964.

L'ESPERANTO -itala-, grandformata. Ĉu la lasta antaŭmilita numero estas januaro-marto 1939?. Mi havas ĝin.

. . .

ANONCETOJ

(Havu la afablecon sendi ilin).-

Mi havas kelkajn duoblaĵojn de diverslingvaj "ŝlosiloj". Mi estas preta sendi ilin al la kolektantoj. Mendu koncernan liston.- R.Molera Moyá (Barcelona)- Hispanio.

=====

Se la enhavo de nia bulteno interesis vin kaj se vi konsideras ke ĝia regula aperado povus helpi nian kolektadon, bv. sciigi tion al nia adreso.

Ankaŭ ni restos tre dankaj al vi se havos la afablecon konigi nin la adresojn de tiuj kolektantoj al kiuj povus interesi la ricevadon de KOLEKTANTO.

Korajn antaŭdankojn kaj ne forgesu ke ankoraŭ UNUECO ESTAS FORTO.

=====